

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Liona bulteno havas novan nomon

En la lasta n-ro, ni prezentis la bultenon de nia amika rondo en Liono, Francio. La bulteno de la junia numero havas nomon “Ĝis Cent”. Pri tio ni raportis en la japanlingva organo “La Tamtamo”, n-ro 569.

Internacia Esperanto-Arkivo – nia amika organizo en Belgio

Ni, nome de Esperanto-Muzeo Jokohama, interkonsentis interŝanĝi duoblaĵojn kun simila organizo en Belgio, nomata Internacia Esperanto-Arkivo (IEspA), kaj jam niaflanke sendis 3 pakaĵojn da libroj tien. Venis informo pri IEspA, kiu lastatempe akiris novan konstruaĵon. Jen resumo.

IEspA, fondo kaj celo

Fondiĝis la Internacia Esperanto-Arkivo, jure en la 25-a de januaro 2021. Tiu movada arkivo celas kolekti, arkivi, protekti, administri kaj fari alireblaj librojn, revuojn kaj aliajn dokumentojn en kaj pri Esperanto kaj planitaj lingvoj, maksimume en ilia originala formo (apud diĝitaj kopioj). La arkivo celas konservadon kiel heredaĵo, por nelimigita tempodaŭro.

La arkivo komence transprenis du grandajn privatajn kolektojn. Aldoniĝas daŭre libroj, revuoj, dosieroj, objektoj en kaj rilate al Esperanto. Ankaŭ vi povas transdoni viajn arkivajn dokumentojn rilate al Esperanto jam nun... aŭ en estonta iamo kiam vi ne plu bezonos ilin mem. IEspA konservos kaj disponigos ilin al esplorantoj.

Arkivejo

Ĝis nun la arkivo troviĝas en granda privata loko. Tio baldaŭ (en julio 2024) ŝanĝiĝos. IEspA ja sukcesis aĉeti grandan arkivejon en la centro de la urbo Diest en Belgio. La spaco sufiĉas por la nuna kolekto kaj ĝia pli ol duoblo. Forluado de aldona apartamento kovros la kurantajn kostojn de la arkivo.

Financa subteno bonvenas (informoj: www.iespa.eu, info@iespa.eu).




eĥoj el Hungario

Gratulon pro via altvalora, enhavriĉa kaj interesa eldonaĵo.

Amike via

Márkus Gábor el Hungario

Dankon



eseo

Malfruaj Sakuroj

Mizro Iwaya

Antaŭ jaroj japana utaistino Tawara Mati prelegis en Germanio pri japana literaturo. Ŝi diris ke japanoj tre amas sakuron/ĉerizfloron kaj sakuraj arboj abundas ĉie en Japanio. En printempo ili ekfloras de la suda regiono al la norda sinsekve. Kiam ŝi diris ke aperas sur japanaj ĵurnaloj novaĵo pri “sakura fronto”, kiu montras la ordon de sakura ekfloro en la formo de klimata fronto, germanaj ĉeestantoj ridegis pro ŝia “humura ŝerco.” Ili ne sciis ke troviĝas tiom da sakuraj arboj en Japanio.

Ni vidis antaŭ dekoj da jaroj ke sakuroj ekfloras komence de aprilo. Tial ni kutimis havi “florspektan festenon (*hanami*)” komence de aprilo. En la lastaj jaroj, ĉu pro klimata varmiĝo de la terglobo, ni ofte vidas ke ili ekfloras fine de marto kaj “la plena florado” aperas en marto, do ni havas florspektan festenon en marto. Tial estas al mi stranga fenomeno ke ili havis plenan floradon komence de aprilo en tiu ĉi jaro.

Ni havis Hamarondan Tagon en la 31a de marto, kaj post tio ni kune iris al la rivero Oooka kie amase viciĝas sakuroj sur la riverbordoj (kiel raportite en nia marta n-ro). La floroj estis en plena malfermo kaj viciĝis multaj manĝobudoj sub la floroj. La plena malfermo daŭris kelkajn tagojn post tio, sed mi aŭdis ke la budoj retiris sin jam en la unua de aprilo, en plena florado! Oni ne povis antaŭvidi ke sakuroj malfruas en tiu ĉi jaro. Do, ni

povis ĝui nur plenan floradon sen regalaĵo post tio.

Stranga afero, sekve, okazis ankaŭ al birdetoj, nome hipsipetoj. Ili tre ŝatas sakuran mielon. Ni povas ofte vidi ke ili haltas sur la branĉo de sakuro kaj suĉas ĝian mielon en la floroj. Ili venas ankaŭ al nia balkono kaj bekumas pecojn de frukto sur la telero, unuope aŭ duope. En la lastaj jaroj ili malaperas ĉe la fino de marto kiam sakuroj floras en plena malfermo. Sed ĉi-jare ili restis ĉirkaŭ ni ĝis la tria de aprilo. Ŝajne ili ne povis sate suĉi sakuran mielon pro tio, ke sakuroj ne estis en plena florado en marto. Mi vidas ĉi-jare ke kobusoj floris kiel kutime, vinkoj kaj hederroj ĝermas kiel kutime ... Sed kial sakuroj floris tiel malfrue? Mi ankoraŭ ne komprenas tion.



sezonvorto junia

Plekogloso (鮭)

Okita Kazumi

Estas japana riverfiŝo frandita somere, precipe rostite. Printempe oni malpermesas kapti la fiŝidojn. La tago de permeso kapti estas decidita de fiŝista sindikato, kiu administras ĉiun riveron. En tiu tago, kiam la kaptado de plekoglosoj iĝas libera, multaj amantoj konkurencas iri hoki ilin per logaĵo de samspeca fiŝo. Multaj riveroj en la Regiono Kantoo (meza parto de Japanio) liberigas la kaptadon la 1-an de junio. “Plekogloso” mem kaj la “permeso de kaptado” estas hajkaj sezonvortoj de somero.

